

# BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

•  
FERII KAJ  
LERNI

•  
JUBILEO DE  
VARSOVIA  
KONTRAKTO

•  
KVINA BOTEV -  
RECITALO

•  
FORPASIS  
ASEN GRIGOROV

•  
OMAGE AL  
G. DIMITROV

•  
LA POEZIO DE  
V. OLJANOV

•  
BEK JUBILEAS

•  
KOMPUTADO?

•  
NI RECENZAS

•  
VICTOR HUGO -  
VERKISTO -  
HUMANISTO



JARO 54 • N-RO 7 • JULIO • 85

# JUBILEO DE LA VARSOVIA

## KONTRAKTO

La unuaj tridek jaroj de ekzistado de la Varsovia Kontrakto, subskribita la 14-an de majo 1955 de Bulgario, ĈSSR, GDR, Pollando, Hungario, Rumanio kaj Sovet-Unio manifestis la decidemon de la sep socialismaj landoj kune defendi la interesojn de la progreso kaj la paco, zorgi pri la necesa bilanco de sekureco. La ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto decide respondas al la minacoj de la imperiismaj militpaktoj per plifortigo de sia defendpotenco, per pli altnivela kunordigo de siaj komunaj militfortoj.

Dum la pasintaj tridek jaroj estis elspezitaj grandaj monrimedoj por garantii la sekurecon de la socialismaj landoj. Tion postulis la supera neceseco — ĉiupreze defendi la vivon de milionoj da homoj kontraŭ nuklea ekstermo.

La historio de la Varsovia Kontrakto konsistas el vico da sinsekvaj preventaj agoj celantaj adekvatan kontraŭstarigon al la minacoj de ĉiam pli kaj pli multiĝantaj kaj modernigantaj atakrimedoj kaj eblecoj de la Nordatlantika Pakto (NATO), al ĝiaj ĉiam pli agresemaj militdoktrinoj. Diference de NATO la Varsovia Kontrakto estas malfermita organizaĵo, al kiu povas aliĝi ankaŭ ŝtatoj kun malsama soci-politika ordo. La nura kondiĉo por ilia membriĝo estas la preteco labori por stabiligo de la paco kaj de la monda sekureco.

Malgraŭ ke la ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto devas, pro la agresemo de NATO, konstante pligrandigi siajn militbudĝetojn, aliflanke ili ĉiam havas prioritaton rilate la iniciatemon fari celkonformajn proponojn al la ŝtatoj el la Nordatlantika Pakto pri solvado de ĉiuj problemoj laŭ paca vojo. Kaj fakte ili faris dekojn da gravaj proponoj por malpliigo de la militminaco, konforme al la interesoj ankaŭ de aliaj ŝtatoj. Diference de iuj limigitaj proponoj de NATO, havantaj precipe teknikan karakteron, la iniciatoj de la Varsovia Kontrakto ĉiam estas esprimo de bonintenco kaj bona volo, celantaj la forigon ne nur de la postsekvoj, sed antaŭ ĉio — la neniigon de la kaŭzoj mem por vetarmado kaj malbonigo de la internacia politika klimato.

Do, estante devigita konstante sin defendi kontraŭ la agresemo de la Nordatlantika Pakto, per siaj pacaj proponoj la Varsovia Kontrakto ĉiam estis iniciatema. Tutkompreneble, oni ne povis permesi al si neglekti kaj forlasi la akiritajn per tiom multe da penoj poziciojn, gravegajn por la estonto de la mondo! Ĉar la militminaco flanke de la Nordatlantika Pakto plu ekzistas, pro tio la valideco de la Varsovia Kontrakto devis esti daŭrigita.

La unuanima decido de la sep ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto de la 26-a de aprilo 1985 plilongigi ties tempodaŭron estas historie argumentita respondo al la agoj de NATO, pli ol ĉiam minacantaj la sekurecon de la socialisma komunajo kaj la mondan pacon.

La subskriboj de la plej altrangaj ŝtataj kaj partiaj gvidantoj de la sep socialismaj landoj — membroj de la Varsovia Kontrakto, sub la Protokolo por plilongigo de ties tempodaŭro dum la sekvantaj 30 jaroj, solene konfirmis la komunan volon por komunaj decidoj kaj iniciatoj en intereso de la mondpaco. La denove subskribita en Varsovio Kontrakto estos firma baro kontraŭ la militminaco.

En sia dekseca sesio la Parlamento de PR Bulgario akceptis leĝon, per kiu estis ratifikita la subskribo de la Varsovia Kontrakto por novaj 30 jaroj.

La ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto ĉerpos sperton el siaj ĝisnunaj agoj kaj iniciatoj por la bono de la popoloj, por plua kunordigo de sia defendsistemo.

La politika pozicio de la ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto restas sensanĝa: serĉi perspektivajn formojn por pli forta influo sur la mondan politikon, por kunlaborado surbaze de reciproka estimo kaj bona volo, por egala sekureco de ĉiuj landoj en la mondo, por daŭra paco.

**RADI BANĈEVSKI**



## FERII KAJ LERNI

*La ferisezono komenciĝis.*

*Finis la lernadon de Esperanto gelernantoj el fakultativaj klasoj de mezlernejoj kaj gekursanoj el multnombraj diversgradaj studrondoj kaj kursoj en la lando.*

*Kaj kio nun?*

*Kiel stabiligi la akiritan lingvoscion, kie ĝin praktiki?*

*Imagu, ke vi sunbruniĝas sur la ora sablo de nia ĉarma Nigramarabordo, aŭ vi ripozas sur verba herbejo en la montaro dum ekskurso. Ĉu iumomente vi ne ekdezirus malfermi vian lernolibron aŭ notkajeron de Esperanto kaj trafolumi ĝin, rememorante la ĝis nun ellernitan materion? Aŭ provi konstrui frazojn en Esperanto por priskribi la vin ĉirkaŭantan belecon? Kaj se vi havis la feliĉan okazon renkonti esperantiston, ĉu vi preterlasus la eblecon iom interparoli, amike babili?*

*Eble iuj el vi ekskursos eksterlanden — gaste al amikoj-esperantistoj. Jen alia favora ebleco praktiki la lingvon. Ni ne parolu pri feliĉuloj, kiuj partoprenos diversajn internaciajn esperantajn aranĝojn! Memkompreneble, ili estos devigitaj interparoli en Esperanto, apliki sian lingvoscion, montri bonan lingvonivelon, prezenti kiel eble plej digne nian E-movadon, nian patrolandon. Longa estas la listo de la aranĝoj en diversaj eŭropaj landoj, kie okazos agrablaj kaj utilaj renkontigoj de esperantistoj! Sufiĉas ĵeti rigardon sur la paĝojn de la numero de „Heroldo de Esperanto“, en kiu estas publikigitaj ĉiuj gravaj E-aranĝoj okazontaj en la mondo ĉi-jare. Vi nepre miros pro ties riĉeco kaj amplekso!*

*Sed ni direktu nian rigardon sur la mapon de Bulgario.*

*La Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica disponigas riĉan lernoprogramon: de 1-a ĝis 20-a de julio kaj de 1-a ĝis 20-a de aŭgusto sub la devizo „Matene lerni, posttagmeze ferii“ okazos la tradiciaj kvargradaj someraj kursoj de Esperanto. Instruos spertaj bulgaraj kaj fremdlandaj lektoroj, en vere internacia etoso la gekursanoj akiros solidajn lingvosciojn kaj havos eblecon ĉiutage praktiki ilin.*

*En IEK-Pisanica ĉi-somere okazos ankaŭ la*

*III Internacia Infana Esperanto-Tendaro, kie la plej junaj adeptoj de la Internacia Lingvo ferios kaj lernos laŭ la rekta metodo, kvazaŭ ludante.*

*Alia formo de lernado de Esperanto dum la feriado estas la someraj kursoj por mezlernejaj instruistoj.*

*En tiuj kursoj sin preparas estontaj instruistoj por la fakultativaj klasoj de Esperanto en niaj mezlernejoj.*

*Ni ne forgesu du aliajn studaranĝojn: la internaciajn seminariojn-feriadojn en vilaĝo Borima (distrikto de Loveĉ) kaj en Velingrad, kie ĉe iom modestaj vivkondiĉoj, sed en la sino de Balkano kaj de Rodopi-montaro, la gekursanoj ferios, ekskursos kaj lernos Esperanton. Tiuj aranĝoj jam havas kelkjaran tradicion kaj vekas viglan intereson en internaciaj E-medioj.*

*En Veliko Târnovo jam trian fojon okazos la Internacia Somera Esperanto-Universitato, kiu ĉi-jare koincidas kun la preparo por celebrego de grava historia evento — la 800-jara datreveno de la ribelo de fratoj Asen kaj Petâr kontraŭ la bizanca jugo kaj de fondiĝo de la Dua Bulgara Regno. Tielcerte ISEU estas la plej altranga somera internacia arango en nia lando, kiu proponas al la partoprenantoj diversetajn prelegojn de eminentaj sciencistoj kaj kulturagantoj — esperantistoj, eblecon por interesaj renkontigoj, amikigoj kaj diskutoj kaj plej grave — ebligas aŭskulti altnivelan, bonstilan Esperanton, plu perfektigi siajn lingvosciojn.*

*Grava kaj impona evento en la vivo de la bulgara esperantistaro estas la okazinta la 6-an de julio j. k. 41-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio. Unu el la plej gravaj problemoj traktitaj kaj en la raporto de CE de BEA, kaj de la delegitoj mem, estis la problemo pri instruado de Esperanto, pri preparo de spertaj instruistoj, pri plua popularigo de la Internacia Lingvo.*

*Se ni opinias nin sindonaj esperantistoj, se ni volas kontribui por plua disvastigo de Esperanto en nia lando, ni konstante perfektigu nian lingvoscion kaj eĉ ferianta ni plu lernul. . . .*

# VIVAS LI, VIVASI!...

La ĉi-jara Kvina Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Revolucia Poezio en Esperanto (okazinta la 25—26-an de majo) pasis en la belega salono de Domo de la Popola Armeo en Vraca, enkadre de la kulturaj festoj „Botev-tagoj'85“.

Per emocia parolado Stojan Pavunĉev, prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Vraca, inaŭguris la recitalon-konkurson en ĉesto de pli ol 150 partoprenantoj kaj multaj gastoj kaj simpatiantoj de Esperanto.



Sinprezentas ensemblo „Serdika“ el Sofio

Junpionira ĥoro el lernejo „Vasil Kânĉev“, Vraca, kun artgvidantino — Lidia Georgieva, kaj la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, sub la gvidado de ĥorestro Dimităr Terziev, plenumis riĉan programon, kies finaneron — la fame konatan marŝon „Gaje fluas blank' Dabubo...“ kantis kaj ĥoristoj, kaj ĉeestantoj en la salonego.

Antaŭ kompetenta ĵurio en konsisto: prezidanto — Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de CE de BEA, kaj membroj: Angelina Sotirova, lektorino en la Supera Instituto de Teatra Arto, Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“, Stojan Pavunĉev, prezidanto de DE de BEA kaj vicprezidanto de la Distrikta Packomitato, Ljubomir Trifonĉovski, vicprezidanto de la Distrikta Konsilantaro de Kulturo, Sneĵina Angelova el la Distrikta Komitato de Komsomolo, Kiril Velkov, vicprezidanto de DE de BEA, kaj Oleg Ĉernev, aktoro el la Dramteatro — Vraca, aperis 57 individuaj plenumantoj kaj 6 artgrupoj el diversaj urboj kaj vilaĝoj de la lando. Partoprenis ankaŭ la eksterlandaj gastoj Lothar Müller el GDR kaj Balla János el Hungario.


Kompare kun pasintjaraj recitaloj-konkursoj de Boteva poezio en Vraca la ĉi-jara partopreno de artgrupoj kaj ensembloj estis relative malpli granda kaj la individuaj plenumantoj nun estis pli multaj.

Kiaj estas la ĉefaj konsideroj kaj konkludoj de la ĵurianoj pri la ĉi-jara recitalo?

Denove — iuj preskaŭ konstante ripetigantaj malperfektaĵoj: unuflanke — troa, superflua patoso, aliflanke — monotona, kelkiam tro sentimentala deklammaniero, superflua gestado (kvankam pli malofta, tamen plu ekzistanta). Mankas artismo, oni senpasiĝe elparolas la tekston, pri kio ni serioze atentigas la plenumantojn. Eĉ kiam suferas, kiam koleiras, Botev neniam estas tro sentimentala; Botev propramaniere esprimas sian koleron, indignon, ĉagrenon. Pro tio la plenumantoj de Boteva poezio devas bone kompreni ties karakteron, ideojn.

Rilate la lingvan nivelon de la plenumoj: oftaj, malĝustaj akcentoj sur la prepozicioj anstataŭ sur la substantivoj (ál libero, pór vi, íam anst.: jám, ktp); tre malmola prononado de la konsonanto „L“; drasta reduktado de iuj vokaloj...

Iuj el la konkursantoj plenumis kelkajn el la plej longaj poeziaĵoj de Botev — „Ĥajdutoj“, „Adiaŭe“, k. a., kio provokis certan enuon ĉe la aŭskultantoj, des pli ke iuj simple fias-



Deklamas Vencislav Vasilev el Vidin

kis. . . Aliaj sin prezentis per longaj komponoj el diversaj poeziaĵoj, kio estas manko de senco pri mezuro. Rekomendinde estas, ke oni elektu nur fragmentojn el longaj versaĵoj (poemoj) kaj plenumu ne pli ol kvin minutojn — tute sufiĉe por sin prezenti. Tial en la sekvontaj recitaloj ni zorgeme elektu nian programon, variigu ĝin ankaŭ per oratorado, per preparitaj komponoj, muntaĵoj, k. a. Ni ne forgesu, ke venontjare oni celebros la 110-an datrevenon de la pereco de Botev!

Kial do tiuj ofte ripetigantaj malperfektaĵoj en preskaŭ ĉiuj niaj E-recitaloj, festivaloj, revuoj? Car malgraŭ la seriozaj atentigoj de jurianoj kaj de organizantoj, oni ne serĉas la konsilojn kaj la konkretan helpon de spertuloj — reĝisoroj, aktoroj, kantartistoj kaj precipe la helpon de la lokaj konsilantaroj de kulturo kaj de aliaj institucioj por altigi la artan nivelon de niaj plenumoj, de niaj aranĝoj ĝenerale.

Certe, ĉiuj ĉi malperfektaĵoj estas ecoj de nia elkresko. Tamen la respondeculoj devas zorgi pri ilia forigo, pli ambicie okupiĝu pri



Partoprenintoj en la Botev-recitalo vizitas la historian vaporsipon „Radetzky“ en haveno Kozloduj ĉe rivero Danubo

la arta preparo de la plenumantoj, pri ilia ĉiam pli bona sinprezento!

**DONČO ĤITROV**

### **DISTINGO POR KUNČO VĀLEV**

*La Distrikta Konsilantaro de Kulturo — Vraca, distingas per „Ora Insigno“ — por kontribuo al la disfloro de nia socialisma kulturo, la ĝeneralan sekretarijon de Bulgara Esperantista Asocio Kunčo Vālev, pro lia granda kaj sindona laboro por organizado kaj okazigo de*

*la Internaciaj Konkursoj-Recitaloj de Boteva kaj Revolucia Poezio en Vraca.*

*La insignon transdonis al la distingito Ceno Vodeničarski, sekretario de la Distrikta Konsilantaro de Kulturo — Vraca.*



Partoprenintoj en la Botev-recitalo antaŭ la monumento de la Botev-taĉmento apud rivero Danubo en Kozloduj

# PREMIOJ DE LA RECITALO-KONKURSO DE BOTEVA KAJ REVOLUCIA POEZIO

## I. INDIVIDUAJ PREMIOJ

La Granda Premio ne estis aljuĝita.

Unua premio — al Todor Todorov el Stara Zagora pro plenumo de „Ridinda Ploro“ de Ĥr. Botev;

Dua premio — al Diana Ivanova el Svoge pro la plenumo de „Letero“ de N. Vapcarov;  
— al Velička Vodeničarova el Velingrad pro la plenumo de „Mia Preĝo“ de Botev;

Tria premio — al Iljana Petkova el Stara Zagora pro la plenumo de „Haĝi Dimitro“ de Botev;  
— al Vanja Boneva el Gorna Orjaŝovica pro la plenumo de „Ŝalmo ludas sur herbejo“ de Botev;  
— al Angelina Atanasova el Plovdiv pro la plenumo de „Elegio“ de Botev;

Al la personoj distingitaj per I, II, kaj III premioj oni aljuĝis ankaŭ la titolon „Laŭreato de la konkurso“.

Premiojn de la Distrikta Packomitato en Vraca ricevas:

Mihaela Januŝeva — Ĉepelare, Mariana Radeva — Pazarĝik, Vencislav Vasilev — Vidin, Nikolina Tarkova — Ĉepelare, Ekaterina Ilieva — Ĉepelare.

La saman premion ricevas ankaŭ Lothar Müller el GDR pro plenumo de Botev-poeziaĵoj.

La premion de la Distrikta Komitato de Komsomolo ricevas Denka Barâмова el Sliven.

Premiojn de la Distrikta Komitato de la Patrolanda Fronto ricevas: Darinka Radenkova — Svoge, Janka Ĥristova — Gabrovo, Kalina Stavreva kaj Albena Filčeva — Sofio.

Premiojn de la Distrikta Konsilantaro de Bulgaraĵ Sindikatoj ricevas: Velina Ĉinčeva — Jambol, Gergana Georgieva — Dimitrovgrad, Nadka Daskalova — Ĉepelare, Kapka Miladinova — Sofio.

La premiojn de la Centra Estraro de BEA ricevas: Galja Goranova — Vraca kaj Valentina Dimitrova — Jambol.

La premiojn de la Distrikta Estraro de BEA — Vraca, ricevas: Desislava Dimitrova — Vraca, Nikolaj Trifonov — Smoljan, Ljubomira Budinova — Velingrad, Tanja Simeonova — Vraca, Zornica Mitreva — Svoge, Stamenka Dimitrova — Botevgrad.

La premion de revuo „Bulgara Esperantisto“ ricevas: Viktoria Dojnova — Vraca.

## II. KOLEKTIVAJ PREMIOJ

Unua premio: ensemblo „Serdika“ el Sofio pro la recitalo „Kiel kanto, kiel versaĵo“. La ensemblo gajnis ankaŭ la titolon „laŭreato“.

Dua premio: ensembloj por arta parolo — Miĥajlovgrad kaj Ĉepelare.

Kuraĝiga premio: ensemblo por arta parolo — Dimitrovgrad.

La premion de la Distrikta Packomitato — Vraca, ricevas: ensemblo por arta parolo — Pazarĝik.

La premion de revuo „Bulgara Esperantisto“ ricevas: ensemblo por arta parolo — Svoge.

Jurio:

Prezidanto: KUNĈO VALEV

Membroj: ANGELINA SOTIROVA  
DONĈO ĤITROV  
STOJAN PAVUNĈEV  
LJUBOMIR TRI-  
FONĈOVSKI  
SNEJINA ANGELOVA  
KIRIL VELKOV  
OLEG ĈERNEV

## PROPAGANDA BROŝURO PRI ESPERANTO

Komence de 1985 la instruista E-societo „Diĉo Petrov“ aperigis la broŝureton „Kio estas Esperanto?“ Iniciatinto estas Marin Băcev, ĉefmetodikisto de BEA, kiu ne nur tradukis el germana lingvo en bulgaran la eldonaĵon „Esperanto auf einem Blatt“ („Esperanto sur unu folio“), sed adaptis ĝin por bulgaroj tiel ke la propa anda efekto estu pli granda.

En „Kio estas Esperanto?“ la leganto povas trovi mallongan informon pri d-ro Zamenhof; populare konatiĝi kun la historio de kreo de la Internacia Lingvo; legi la opiniojn pri Esperanto de famaj bulgaroj: akad. Georgi Ka-

raslavov, prof. Asen Zlatarov, akad. Stefan Mladenov, prof. d-ro Miĥail Arnaudov, akad. Todor Pavlov, prof. Ivan Duridanov. Krome la broŝuro proponas koncizan E-gramatikon kaj nomaron de la sekcioj ĉe BEA (entute 27), kun adresoj kaj telefonoj de iliaj prezidantoj kaj sekretarioj.

Tiu propaganda broŝuro estas destinita por la vasta publiko. La dezirantoj povas mendi „Kio estas Esperanto?“ laŭ adreso: 1000 Sofio, str. „Generalo Pjotâr Parensov“ 11, Centra Domo de la Instruisto.

Maria JANKOVA

# LA ETERNA LABORANTO

(Memore al Asen Grigorov)



(29. 1. 1903—22. 5. 1985)

La plej ŝatata kaj plej estimata inter la veteranoj de Bulgara Esperanto-Movado k-do Asen Grigorov jam ne plu estas inter ni. La senkompata Morto forprenis lin de ni — liaj amikoj kaj ŝatantoj. Mi persone perdis por ĉiam mian malnovan amikon kaj kamaradon, kun kiu ni dividis ĝojojn kaj suferojn dum pli ol kvindek kvin jaroj. Li estis ankaŭ mia konsultato pri dubindaj lingvaj kazoj. Eĉ en la titolo de tiu rememoraĵo mi tute intence uzas la vorton „laboranto“ anstataŭ mia kutime uzata „laborulo“, ĉar Asen preferis nome tiun vorton kaj argumentite rekomendis ĝin al mi en mia lasta traduko „La Sindikatoj kaj la Paco“, kiun li redaktis laŭ propra deziro.

Kun Asen Grigorov mi persone konatigis nur kelkajn jarojn post kiam mi konis lian nomon kaj lian poezion el la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ — inter la jaroj 1925-1929. Mi prezentis al mi lin laŭ liaj poeziaĵoj kiel poeton el la falango de la tiel nomataj (ne tute ĝuste) bulgaraj simbolistoj. Ili estis plejado da junaj kaj talentaj poetoj, kiuj suferis kune kun sia popolo, sed ne kapablis percepti la revolucion eliron el la mizero, en kiu la kapitalisma sociordo dronigis la bulgaran popolon. Pli preciza pritakso de ties poezio pruvas, ke eĉ en ekstere simbolisma formo ili tamen tre realisme pentris la bildon de la popolaj suferoj.

Ilia socia kaj eĉ persona tragedio konsistas en tio, ke ili ne sentis apogon en la socia vivo, ili ne fidis al la tiam ankoraŭ malforta revolucia partio de la bulgaraj marksistoj, ne estiĝinta konsiderinda socia faktoro en la evoluo de la socia vivo dum la periodo antaŭ kaj post la fino de la Unua Mondmilito. Tial ili estis kaj iuj el ili restis entute individuistoj en la poezio kaj en la socia vivo. Pro tio, ne vidante klaran perspektivon, ili priploris la plagojn de la vivo, plendis pro la fortaj vivbatoj, serĉis ian imagatan feliĉon, kaj ne trovante ĝin ili falis ofte en pesimismen. Ili sincere suferis kaj sincere malesperiĝis.

Asen Grigorov apartenis al tiu individuisma kohorto. Kvankam liaj poemoj sonis bele kaj ilia lingvaĵo estis mirinde poezia, mi ne dividis la etoson de tiuj poemoj. Mi jam estis orientita al la revolucia movado kaj mi revis pri tute alia eliro el la ekzistanta situacio. Sed al mi faris fortan impreson la sincera malĝojo de tiu poezio. Mi ne esperis, ke Asen Grigorov eskapos el la retoj de la simbolismo.

Guste pro tio estis tre granda mia surprizo, kiam mi kun k-do Lakov, helpate de kelkaj aliaj sofiaj esperantistoj, devis fondi la unuan en Bulgario laboristan Esperanto-revuon „Balkana Laboristo“. Parolante pri la neceso de kunlaborantoj kapablaj traduki revolucionan poezion en Esperanton por publikigi ĝin en „Balkana Laboristo“, mi tute neatendite aŭdis de k-do Simeon Petrov, ke ni povas certe kalkuli je Asen Grigorov. Mi demandis Simeonon: tamen ĉu vi scias, ke li estas ĝisosta neŭtralulo kaj fremda al nia marksisma ideologio? Simeon respondis al mi, ke Asen ne plu estas tiu, kiun ni konas laŭ liaj publikitaj poemoj. Li jam orientiĝis al la revolucia laborista movado. Tio tre mirigis min, sed mi akceptis tiun informon kun granda plezuro.

Ni ricevis de Grigorov pere de Simeon Petrov, tradukojn de Ĥristo Smirnenski, ankaŭ originalajn versaĵojn kaj rakontojn. Poste ili ĉiuj aperis libroforme sub diversaj titoloj kaj pseŭdonomoj.

Tiel en la komenco mem de nia laborista esperantista eldonagado ni jam disponis pri granda majstro, kio certe levis la literaturan nivelon de „Balkana Laboristo“ kaj faris ĝin interesa eĉ por neŭtraluloj, kiuj ne tute dividis nian revolucionan socian pozicion, sed ŝatis nin kiel agemajn esperantistojn.

Asen devis uzi pseŭdonomojn kaj ni konservis en sekreto lian kunlaboradon al „Balkana Laboristo“, ĉar li tiam estis oficisto en la Ministerio de Poŝtoj, Telefonoj kaj Telegrafoj. En kontraŭa kazo lin minacis maldungo kaj malsatado. Li jam havis du infanojn, lia edzino ne plu laboris kaj li sola subtenis la familion. Ni gardis lin kiel juvelon.

Sed, kiel atestas la popola proverbo, „Sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas“. Asen tiel entiriĝis en la praktikan batalon de la laborista movado, ke finfine la polico malkovris lian agadon kaj arestis lin kune kun multaj aliaj kamaradoj. Li restis en la malliberejo dum la jaroj 1941—1943.

Sed li jam estis farinta multon por la sukceso de BuLEA dum la periodo de ties legala ekzistado kaj post ĝia malpermeso, kiam la laboristaj esperantistoj denove eklaboris en la vicoj de la neŭtrala BEA. Krom tradukoj kaj originalaĵoj kun literatura karaktero, li verkis ankaŭ priorganizajn artikolojn, helpadis en la preparo de la direktivaj instrukcioj, korespondis kun niaj aktivuloj en la nomo de CK de BuLEA. Tre grava, eĉ gravega, estis lia iniciato relabori la por rusoj preparitan esperantan lernolibron de Sergej Rubljov. Al

ĝi li aldonis ankaŭ apartan libreton kun instrukcioj por kursgvidantoj. Tiu lia relaborajo evidentiĝis tiel sukcesa, ke ĝi estis kvin-sesfoje reeldonata. La lasta pliampleksigita sepa eldono estis farita de Grigorov en kunlaboro kun Violin Oljanov.

Grigorov daŭre kaj aktive laboris ankaŭ post la liberiĝo de nia lando el sub faŝisma jugo. Li verkis multajn poemojn, faris tradukojn el la bulgara literaturo, redaktis revuojn („Internacia Kulturo“, „Nuntempa Bulgario“), librojn, estis lingva konsultato de revuo „Paco“ ktp. Tiel li kondukis preskaŭ ĝis sia lasta spiro. Nur monaton antaŭ ol forpasi, li redonis al mi mian tradukon „Cent demandoj kun cent respondoj pri la bulgara virino“, klarigante ke li ne povas jam okupiĝi pri literatura agado pro ege malboniĝinta sanstato.

Se oni provus per kelkaj vortoj karakterizi tiun talentan esperantiston, oni povus tute trafe lin nomi „la eterna laboranto“ sur la revolucia tereno kaj pli speciale — sur la vasta tereno de nia landa kaj eksterlanda esperantista movado.

Nikola ALEKSIEV

## Amiko de blinduloj

La 22-an de majo 1985 forpasis Asen Grigorov — fama E-poeto, arda marksisto, pasia batalanto por interpopola interkompreniĝo kaj paco, amata instruisto kaj amiko de blinduloj!...

Lia konateco kun la blinduloj datumas ekde antaŭ sesdeko da jaroj, kiam li komencis instrui Esperanton en la Stata Instituto por Blinduloj. Per sia afabla rilato kaj bonkoreco li gajnis, allogis la lernantojn al si, al Esperanto, al siaj humanaj ideoj. Kvankam post 7 jaroj, pro politikaj kaŭzoj, oni ĉesigis lian instruadon en la lernejo, la ligo de la lernantoj kun li ne ĉesis. Kiel plenaĝaj homoj ni, unuope aŭ grupe, vizitadis lin hejme. Ni vizitadis lin kiel gefiloj vizitas sian propran patron, dividis kun li niajn malfacilaĵojn kaj sukcesojn. Lia familio akceptis nin kiel siajn anojn...

Bedaŭrinde, li ne povis vidi nian ĉi-jaran sukceson: la Asocio de la Blinduloj en Bulgario komencis eldoni trimonatan brajlan revuon en Esperanto „Esperanta Fajrero“, kiu havas legantojn en la tuta mondo. Ĝi komencis ra-

konti al la eksterlandanoj pri la vivo de la blinduloj en socialisma Bulgario. Kaj estas kion rakonti: jam mankas la blindaj kolportistoj, kiuj dum varmega kaj frosto staris sur la stratoj por gajni pecon da malmola pano, mankas la blindaj muzikistoj en la drinkejoj, kiuj vivis almoze. Nun en nia lando ne estas senlabora blindulo. Dank' al la Bulgara Komunista Partio, kies aktivulo Grigorov estis, por la nevidantoj estas kreitaj specialaj produktadaj entreprenoj, kie ĉe konvenaj kondiĉoj ili partoprenas en la materiala produktado. Aliaj laboras kiel masaĝistoj, programistoj, instruistoj kaj scienclaboristoj...

Alarme sonoras la telefonoj:

„Halo! Ĉu vi sciigis, ke nia bona, amata instruisto Asen Grigorov forpasis?...“

Nel! Tio ne estas vera! Liaj ideoj kaj lia baltalema spirito restis ĉe ni, en niaj koroj, en la koroj de liaj fidelaj adeptoj!

**Todor ŜOŜEV,**  
prezidanto de la Sekcio de  
Blindaj Esperantistoj

# NEFORGESEBLAJ RENKONTIĜOJ KUN DIMITROV

Kun la jugoslava inĝeniero Milorad Gurĝević el Smederevo ni konatiĝis dum internacia E-tendaro apud Pécs, Hungario. Al mi faris impreson, ke li bone parolas bulgaran lingvon kaj ŝatas kanti bulgarajn kantojn. Kaj li tute ne kaŝis sian emon esti en la kompanio de bulgaroj. . .

Evidentiĝis, ke Gurĝević estis unu el la 13 mil jugoslavaj infanoj, orfiĝintaj pro la milito kaj trovintaj azilon en nia lando.

Responde al mia peto li volonte konsentis rakonti por la legantoj de gazeto „Borba“ siajn rememorojn pri tiu tempo. Kune kun multaj siaj samaĝuloj kaj samnacioj li loĝis en Trojan, stabiligis sian sanon, restarigis sian animekvilibron. Jam tiam lin ravis la beleco de Bulgario kaj la amikemo de ĝia popolo. „Unue mi aŭdis la nomon de Georgi Dimitrov — skribas Milorad — en la somero de 1945, kiam nia edukanto detale rakontis al ni pri la vivo kaj agado de tiu granda bulgaro. Dum la sama jaro mi havis la feliĉon dufoje vidi lin persone. Unue en Novo Selo, kie Dimitrov flame parolis antaŭ milmila popolo. Oni prezentis al li la jugoslavajn infanojn. Li direktiĝis al ni gaja kaj afabla, salutis nin ĉiujn, kisis la etulojn. Ni longe aplaudiis lin, kantis al li partizanajn kantojn. Dimitrov evidente estis emociita kaj kantis kune kun ni.“  
Kun aparta fiero rememoras Gurĝević sian duan renkontiĝon kun Dimitrov. Estis la 9-a de Septembro 1945, la unua parado en la ĉef-

urbo omaĝe al la venkinta revolucio. Ĝin partoprenis ankaŭ la jugoslavaj infanoj. Milorad Gurĝević marŝis en la frunta kolono kaj kun brilantaj okuloj rigardis la homon sur la tribuno, oferintan siajn plej bonajn jarojn, por ke estu paco kaj feliĉo por la infanoj.

„Nun jam por vi estas tute klare — li skribas — kial mi nomas Bulgario mia dua patrujo“. Fakte tamen kun Bulgario lin ligas ne nur la rememoroj el la infanaĝo. Inter liaj multnombraj alilandaj amikoj-esperantistoj nun la bulgaroj okupas unuan lokon laŭnombre. Kaj Dimitrov estas viva en lia koro kaj ĉiam altiras lin al Bulgario.

HRISTO MANOLOV  
(el ĵurnalo „Borba“ —  
Veliko Târnovo)

IVAN KRĀSTEV

## NESTO ĈE LA MAŬZOLEO

Sub blanka maŭzolea viziero  
konstruis neston gaja hirundet'.  
Sin portas blankaj nuboj en aero,  
ektermas foliaro en kviet',

La gardsoldato al la nest' rigardas  
kum amo ekridetas li sen mov'.  
la birdon gajan la junulo gardas,  
ĉar tristus ja sen kantoj Dimitrov!

Tradukis: Nikola UZUNOV

## Forpasis Vilho Setälä

La 11-an de aprilo 1985 nin atingis funebra mesaĝo: forpasis doktoro Vilho Setälä.

Pli ol duonan jarcenton li estis la kolono de la movado en Finnlando: vortaristo kaj pedagoga verkisto, prezidanto kaj poste honora prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, direktoro de Esperanto-Instituto de Finnlando, fondinto kaj ĉefa aganto de Fondumo Esperanto (li ankaŭ redaktis ĝian gazeton — li estis la plej longtempa ĉefredaktoro — de 1918 ĝis 1973. En tiu jaro Vilho Setälä estis promociita doktoro pri filozofio honoris causa de la Universitato de Helsinko), ĉefredaktoro de „Esperanta Finnlando“, distrikta delegito de Universala Esperanto-Asocio, tradukanto, instruanto, donacanto, gvidanto, la mova forto. Aŭgustino de 1930, membro de la Lingva Komitato jam de 1921, li multe influis la evoluon de la Internacia Lingvo.

Setälä multe verkis kaj tradukis, ankaŭ lernolibrojn kaj vortarojn. Konataj estas lia „Privilegia vojo“ kaj la 500-vorta konciza

kurso „kompilita“ surbaze de liaj leksik-stistikaj esploroj. La lernolibroj de Setälä ne estis kunmetaĵoj de parkerotaj frazoj. Ili havis kernan ideon, pedagogian principon ĝisfunde ellaboritan, kiu celis kaj sukcesis grave helpi la lernadon. Tion bone ekzemplas la simpla, sed efika „Privilegia vojo al lingvoscio“, kiu ĉiupaŝe proponas al la lernanto zorge ekvilibritan kvanton de materialo nova en ĉirkaŭteksto jam konata.

La lingva idealo de Vilho Setälä estis io kristale klara, klasike simpla, senartifika. Li scipovis utiligi la esprimopovon de la Internacia Lingvo en maniero admirinda. Plej bone tion pravas liaj tradukoj el finna liriko. Kiu prenas lian lingvouzon kiel modelon, tiu estas kaj estos sur firma vojo al bona stilo.

Ni funebras profunde, sed la funebro pasos. Restos tamen liaj verkoj, lia heredaĵo, spirita kaj materia.

HARRI LAINE  
(El „Esperanta Finnlando“, 3/1985)

# LA POEZIA VERKARO DE VIOLIN OLJANOV

Kronologie la loko de Violin Oljanov en la bulgara Esperanto-poezio estas tuj post la revolucia trio Dimitro Zlatarski, Hristo Gorov kaj Asen Grigorov.

Violin Oljanov naskiĝis en u. Varna (1919). Li studis juron en la Sofia Universitato (1939—1943) kaj rusan filologion kun specialigo pri ĵurnalistiko — en la Universitato de Leningrado (1949—1954). Li fariĝis esperantisto en 1933.

En oktobro kaj novembro 1936 „nekonataj“ faŝistoj, sub protekto de la polico, atakis du fojojn per bomboj la novan klubejon de Esperantista Societo „Albatr(os)o“ en lia naskiĝurbo. Tiuj du atakoj ne timigis kaj ne forpelis la esperantistojn. Tute kontraŭe, multaj junuloj kaj civitanoj aliĝis al la societo, lernis diligente Esperanton kaj verve partoprenis en la multnombraj kulturklerigaj iniciatoj. Sed ne nur tio — en tiu kriza momento aperis nova poeto — Violin Oljanov (Zefiro).



Grupo da esperantistoj el Varna ekskurse al „Oraj sabloj“, julio 1937. Dekstre — Violin Oljanov. Meze (kun okulvitroj) — d-ro Trifon Milev.

En sia unua poemo „La senmorta „Albatr(os)o“, dediĉita al la Esperantista societo en u. Varna, la juna poeto Zefiro — tiam aĉe — 17-jaraĝa, eksigita el la gimnazio pro kontraŭfaŝisma agado — laŭtigas sian voĉon kontraŭ la faŝismo por socia progreso.

En la sama periodo Oljanov verkis ankaŭ la poemon „Kvindek Jaroj“ (januaro—februaro 1937), dediĉita al la duonjarcenta jubileo de Esperanto:

**„Persekutis vin barbaroj  
kaj minacis per detru’ —  
pruvon donas Kvindek Jaroj:  
mortos vi neniam plu!“**

Per tiu poemo li plifirmigas sian pozicion de batalanto kontraŭ la faŝismo. Plue Violin Oljanov vastigas la arenon de sia kontraŭfaŝisma batalo per la alegoriaj poemoj „Kanto de l’Gufoj“ (majo-junio 1937) kaj „Malliberulino“ (marto 1939). En „Kanto de l’Gufoj“ la juna poeto senmaskigas la nesatigeblan mondregemon kaj obskurantismen de la faŝista imperiismo:

**„Okulojn niajn pikas vero,  
en kot’ ni trovas ĝuon —  
subigi volas ni la Teron,  
ni — gufoj kaj noktuoj!“**

**For, for de ni la lumo!“**

En la poemo „Albatranoj“ (decembro 1938) Violin Oljanov pentras la bildon de epso batalo fare de membroj de la Esperantista societo „Albatr(os)o“ kontraŭ la faŝismo:

**„En ĉi tempo de teruro, furioz’,  
kiam la fantomo fajra tra la valoj  
kaj tra l’montoj ĉion turnas en kaos’,  
tra obstino kaj tra baroj  
marŝas viglaj Albatranoj.“**

En la periodo 1938—1941 Violin Oljanov preskaŭ sinsekve verkis tri poemojn, en kiuj li prezentas la vivon kaj la faron de L. L. Zamenhof. En la poemo „Al Zamenhof“ (decembro 1938) la iniciatinto de Esperanto estas bonfaranto por la homaro, kiu kreis kaj disponigis al la internaciistoj efikan armilon por helpi ties noblan agadon por konstruo de „Libera Homaro“. Iom poste la poeto revenas al la sama temo kaj detalias ĝin per la poemoj „La Majstro mortis“ (aprilo 1939) kaj „Al la morto de l’Majstro“ (februaro, 1941).

Post la venko de socialismo en Bulgario (1944. 09. 09) Violin Oljanov daŭrigas verki poezion, kvankam lia ĉefa okupo estas ĵurnalismo. Li admiras la belajn panoramojn de la naturo, prezentante samtempe riĉan gamon de emocioj en la poemoj „La Dolomitoj“ (novembro 1960), „Aŭtuno“ (septembro 1961), „En la Montaro“ (1964) k. a. Per la poemo „La Dolomitoj“ Violin Oljanov gajnis la unuan premion pri poezio en la konkurso organizita honore al la 31-a Kongreso de Italaj Esperantistoj en Kortina d’Ampeco (1960. 09. 10—16).

Dum tiu periodo la poeto estas senlaca pacdefendanto („Veploro Imperiista“, 1962), sed li ne estas forgesinta la malfacilajn jarojn de batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. En la poemo „Amiko“ (julio-aŭgusto 1976) Violin Oljanov kortuŝe rakontas pri sia kamarado-samĉambrano, kune kun kiu ili malsatis, diskutis promenanten en la tritika kamparo apud la urbo.

En iu glacie malvarma nokto ĝendarmoj, arestis kaj forkondukis lian kamaradon, ne plu revenintan. La poeto restis sola. La rememoro

pri neforgeseblaj diskutoj kaj planoj dum iamaj promenadoj lin vokas al la kamparo — maro da ondigantaj cerealoj, kaj lia amiko ankaŭ estas tie, en la granita monumento.

Amplekse estas ŝargita per personaj emocioj lia lirika poemo „La pordo fermiĝis“ (1966). Gi estis distingita per triagrada premio en la konkurso pri poezio honore al la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto (1966). „La pordo fermiĝis“ aperis en la antologio de la belliteraturaj konkursoj „25 jaroj“, eldonita en Budapeŝto (1977). Per tiu poemo Violin Oljanov partoprenas en la dua eldono de „Esperanta Antologio. Poezio 1887—1981“, eldonita de UEA okaze de la 100-jariĝo de Esperanto (1984).

CANKO MURGIN

VIOLIN OLJANOV

### AMIKO

Estis ni amikoj — loĝis kune,  
kune kantis kaj promenis —  
manĝis panon ni komune  
ĉe la tablo mizerplena.

Bonaj estis ni amikoj,  
ŝatis arde disputadi —  
kiam spikis la tritikoj,  
kiam zumis la cikadoj.

Reliefis juna revo  
en malsataj niaj koroj  
kaj ne foris ni de l'devo —  
la socian korpon bori.

Sed ekestis vintro frosta —  
sur la stratoj vento hurlis,  
ĝis medolo de la ostoj  
rodis sento misaŭgura.

Februara nokt' alarma  
frapis sur la pordon krude  
kaj invadis figendarmoj,  
iris for kunfrato trude.

Kvar okuloj adiaŭis  
en obskuro februara. . .  
Kaj la ŝtorm' rikane plaŭdis,  
en akordo muĝis maro.

Pasis nokto, la obskura,  
kaj ekestis tago hela,  
brilas suno en purpuro  
sur floranta kampo bela.

Kaj denove disputadi  
kun la frat' mi arde revas,  
ĉar denove la cikadoj  
simfonias, flugas mevoj.

Solas mi sub firmamento,  
inter herbo kaj tritiko. . .  
Fiksis min el monumento  
disputema. . . la amiko.

1976

## „NE EBLAS FLANKENIĜI DE L'EPOKO...“

REGINA DERIEVA apartenas al la generacio de junaj sovetaj poetoj.

En siaj du poemlibroj „SKRIBMANIERO“ (1978) kaj „NODO DE L'VIVO“ (1980) la juna lirikistino esprimas siajn impresojn kaj sentojn pri la paca vivo en Sovetio. Samtempe ŝi ne forgesas ankaŭ la grandegajn damaĝojn al sovetaj urboj kaj vilaĝoj, la suferojn travivitaĵojn de la loĝantaro de Sovetunio kaj de la sklavigitaj popoloj de aliaj landoj dum la Dua Mondmilito. Ŝi fundamente studis la amaran kaj samtempe abnegacian batalon de la kontraŭfaŝistaj fortoj por savi la mondon de la terurego de l'faŝista pesto.

Ĉi-sube estas prezentitaj en esperanta traduko du ŝiaj versaĵoj. La unua — „Dediĉo“ — preskaŭ en la spirito de la fama rusa poeto Nikolao Nekrasov, skizas la poezian kredon de l'aŭtorino. La strofoj „Ne eblas flankeniĝi de l'epoko, ĉirkaŭe kiam furiozas la milito“ estas rekte direktitaj al nia epoko de grandioza batalo kontraŭ nuklea katastrofo. Ili kvazaŭ flustras al niaj samtempuloj: „Ne staru flanken de la pacbatalo! La epoko mem trudas al ni la noblan devon batali aktive por savi la homan kulturon kaj civilizon!“

La dua poemo enhavas certan biografian elementon, ŝia patro estas partopreninto en la Patrolanda Milito de l'soveta popolo. Al la juna poetino la grandioza krakado de la batalo prezentigas kiel „preludo de orgeno en amasa popola plenumo“.

La bulgara popolo ŝuldas sian liberigon el sub faŝista jugo al la venka marŝo de la Soveta Armeo. Ĝi decidmaniere helpis la eksplodon de l'socialisma revolucio en Bulgario antaŭ 40 jaroj. Tial la poezio de Regina Derieva, respegulanta la heroojaĵojn de la brava sovetata popolo, kiu savis la homan kulturon de la barbaraĵoj de l'hitlera faŝismo, trovas kompreneman reeĥon en ĉiu bulgara koro.

NIKOLA ALEKSIEV

### DEDIĈO

Ho poezio, estas vi traduko  
en vortoj de l' natur':  
vi — ĝia vivnecesa suko,  
vasteco kaj lazur',  
kaj stela lum' silenta,  
flustranta foliar',  
kaj vigla flu' torenta,  
pepado de birdar'...

Sed en la mezo de ruinoj  
vi estas veng'. Kaj ĵur'.  
Kaj lukto. Kaj sciigo  
pri venko en futur'.

Kaj teleskopo, kiu proksimigas  
al ni jarcentojn. Kaj eventojn.  
Kaj novajn horizontojn. Novajn montojn.

Nun forte sonas strofo pri  
kaptuko nigra, orfa kri',  
tro frua prujno en harar',  
brulanta kampo kaj alarm'.  
Atentu, strof', ne preterlasu  
postsignojn de l'invad':  
ŝimhavan panon en la mano  
kaj supon el urtik'.  
Ne eblas flankenigi de l' epoko,  
ĉirkaŭe kiam furiozas la milit'.  
L'infanterio de la strofoj vin alvokas,  
al la patruj' sindona estas ĝi.  
L'infanterio de la strofoj kun impeto  
atingos la murdistojn — ĝusta paf'!  
En kiu ajn angulo de l'planedo,  
la vort' pli akra estas ol la glav'.

El la rusa: VENELIN MITEV

## EL LA CIKLO „VIVANTA HISTORIO“

Mia patro, historiisto laŭ animo  
kaj ŝatanto de l'klasika muziko,  
kontraŭ la nazioj militis sen timo,  
lernis li historion praktike.  
Tra l'terura krakado kanona  
kaj komandoj de l'estro plotona  
ŝajne sonis prelud' de orgeno  
en amasa popola plenumo.  
Kaj post jaroj kun granda talento  
senmortigos Vučetić en monumento  
la soldatojn, kiuj en la fajrego de Stalingrado,  
plenumante la devon al la Panjo-Patrio,  
estis kamaradoj de la viva historio.

El la rusa: VENELIN MITEV

## NI GRATULAS

Kun plezuro ni informas, ke en la Institutu de Lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj de USSR (Moskvo) okazis defendo de la disertacio de Boris Kolker pri temo „Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto“. Scienca gvidanto — prof. d-ro Magomet Isajev. Oficialaj oponentoj — prof. d-ro Viktor Grigorjev kaj docento d-ro Sergej Kuznecov. Recenzanto de la kompetenta institucio (Tartu-a universitato) — prof. d-ro Aleksandr Duličenko. Rezulte de la sukcesa defendo, la disertacia konsilio, konsistanta el elstaraj lingvistoj, aljuĝis al k-do Kolker la sciencan gradon „Kandidato de filologiaj sciencoj“ (ekvivalento al la eksterlanda „doktoro“) pri la specialeco „ĝenerala lingvoscienco“.

Ni elkore gratulas s-non Kolker!

LA REDAKCIO

## Pri impona libro

MANFRED ARNOLD

Tre impona libro estas la membiografio „Mia vivo“ de Trifon Ĥristovski, kiu aperis en 1981 en Sofio (Sofia Pres), 180 p. Temas pri emocia vivo de kripla kamparana filo, kiu memstare evoluis per grandioza energio al klera homo, verkisto, komunisto kaj konata esperantisto. Li vivis dum la jaroj 1905 ĝis 1944 en la vilaĝo Radotina ĉe Sofio. Tiu ĉi admirinda viro jam kiel sesmonata bebo paralizigis pro poliomjelito, sekve de tio liaj kruroj kaj lia dekstra brako restis neevoluintaj. Nur la maldekstran brakon li povis movi. Plie li suferis je osta tuberkulozo. Terura vivo! Li ne kapablis viziti lernejojn, ne povis helpi siajn gepatrojn dum la kamparlaboro, nek kapablis edziĝi, sed li akiris vastajn konojn pri historio, geografio, politika ekonomio, gramatiko, sociologio, literaturo, eĉ pri medicino, korespondis kun multaj esperantistoj en la tuta mondo, kaj skribis artikolojn kaj librojn! Ankaŭ la vivkondiĉoj en vilaĝo dum la faŝista regado la konstanta manko de mono ne malpezigis lian vivon. Des pli mirigaj estas la fortoj, kiujn li evoluigis el si mem, el sia neŝancelebla fido pri la vivo, el sia konvinko pri la hela estonto de sia popolo. Mankas al mi la vortoj por esprimi la profundan impreson, kiun postlasis al mi tiu ĉi libro, tiu ĉi membiografio — fakte skribita sur la morta lito dum grandaj doloroj. Trifon Ĥristovski certe ne apartenas al la plej grandaj verkistoj de la mondo, sed kia homo! Mi rekomendas tiun ĉi libron ne nur kiel bonan E-literaturon — bonege tradukita de la konata bulgara esperantisto Nikola Aleksiev — sed ankaŭ, ĉar ĝi peras, kiom la homo kapablas efektivigi, kiam li konscias pri siaj fortoj.

## TRIFON

MANFRED ARNOLD

(dediĉe al la bulgara kamarado  
Trifon Ĥristovski)

Vi havis korpon, certe, jes,  
sed estis vere vi martiro,  
ĉar propran paŝon ne al vi  
permesis la kruela sort'.  
Penigaj estis viaj movoj,  
sed apartenis ĉiu spiro  
de vi al forto kaj al venk'  
de l'homa viv' — ĝis via mort'!  
Kaduka estis via korpo  
kaj kripla, plena de dolor',  
sed grandaj via am', spirito  
kaj volo, bona via kor'.  
Se oni kronus vivoforton,  
kuraĝon: via estus kron'!  
Vi venkis malfortecon, morton,  
per superhoma fort', Trifon!

Vi eĉ ne iris en lernejon —

por vi tro fora estis ĝi,  
sed vi neniam malesperis  
aŭ plendis pri sufoka dom'.  
Sopiro via al klereco,  
tro forta estis ĝi, ke vi  
venkadis ĉiujn ajn problemojn,  
kaj iĝis klera, sperta hom'.  
Aŭtodidakte vi studegis  
ĝis vi superis ja per saĝo  
la konojn, sciojn de l'kunuloj  
en via domo kaj vilaĝo,  
farigis lante, pec' post peco  
eĉ en kampara region'  
solida centro de klereco,  
vi, kamparana fil', Trifon!

Vi ĉiam vivis en mizer',  
neniam povis gajni monon  
por manĝo, vestoj, kuracil'  
aŭ libroj, kiujn vi tre ŝatis.  
Tro eta estis la bien'  
por kovri vian vivbeznon,

ke ofte via famili'  
pro malabundo ja malsatis.  
Maljunaj estis la geavoj,  
patro restadis en la for',  
kaj nur la fortoj de l'patrino  
malgrandis por la kamplabor'.  
Vi mem donintus ja subtenon  
al la gepatra hejmbezon',  
sed viajn volon, ardon, penon  
malhelpis via fart', Trifon.  
Vi amis el profunda kor'  
unuavice la gefratojn,  
sed ilin ŝiris for de vi  
la morto sen ceremonio.  
Konstante ankaŭ amis vi  
amikojn, bonajn kamaradojn,  
el kiuj multajn pro l'sinteno  
murdus per fort' la reakcio.  
Dufoje amis vi virinojn  
kaj revis pri la ĝojedziĝ'  
sed ne koncedis ja la vivo  
al vi la ŝancon de feliĉ'.

Vi amis la popolon vian,  
sopiris nur al ĝia bon'.  
Pro tio donas amon ĝian  
nun la popolo! al vi, Trifon!

Batalo estis la enhavo  
de via sencoplena vivo.  
Per via plumo vi batalis  
— unue nur en via lando —  
per eltenema energi'  
por progresema perspektivo.  
Eĉ aŭdis vin la tuta mond',  
ĉar skribis vi en Esperanto.  
„Por la feliĉo, por liber!  
ja estis ĉiam via moto.

Por tio estis vi model',  
vi, komunist' kaj patrioto!  
Al vi, heroo de l'popolo,  
admiro decas kaj impon'!  
Por ni vi restos la simbolo,  
Ni ne forgesos vin, Trifon!


## Tri opinioj

En vilaĝo Trud, distrikto de Plovdiv, estas tri esperantistoj — Ivan Uzunov kaj du aliaj, kiuj ambaŭ portas la saman nomon—Aleksandâr Plaĉkov. Ili estas avo kaj nepo. Estas tre agreble aŭskulti, kiam la avo interparolas kun sia nepo en Esperanto! Des pli agreble estas, ke la juna Aleksandâr Plaĉkov, kiu nun soldatservas en la Bulgara Popola Armeo, sukcese partoprenis en la muzikaj-literaturaj revuoj de BEA.

La maljuna Aleksandâr Plaĉkov estas aktiva esperantisto de 1929. Li instruis la Internacian Lingvon. Lia lernanto Ivan Uzunov danke kaj estime prononcas la nomon de sia instruanto, ĉar per la lingvo Esperanto li akiris multajn amikojn. En nia interparolo ni tuŝis la demandon pri popularigo kaj disvastigo de Esperanto. Kaj jen kian interesan proponon interalie faris Ivan Uzunov: „La bulgara Esperanto-Teatro prezentas spektaklojn ĉe ni kaj en alilando. Pasintjare oni solene notis la 25-jaran aktivan teatran agadon de la konataj bulgaraj geaktoroj-esperantistoj Belka Beleva kaj Anani Anev. Ĉu la Bulgara Televido ne povus elsendi ilian spektaklon en Esperanto?“

Aleksandâr Plaĉkov — la avo — same opinias, ke Bulgara Televido povus kaj devus helpi por kreo de intereso al la Internacia Lingvo (per informoj pri la laboro de BEA, pri la manifestiĝoj de la bulgaraj esperantistoj) kaj por ekposedo de la lingvo mem (per televidaj kursoj). Racion solvon atendas ankaŭ la problemoj pri instruado de Esperanto en malgrandaj loĝlokoj. „Ĉu la Ministerio de Popola Klerigo — proponas Aleksandâr Plaĉkov — ne povus aranĝi, ke la instruado de Esperanto estu inkludita en la instruprogramojn por preparo de instruistoj por la elementaj mezaj lernejoj?“

En v. Bratanica, distrikto de Pazargik, mi interparolis kun Atanas Dimitrov, instruisto en lernejo „Ĥristo Botev“. Temo de nia interparolo estis — „Esperanto kaj etuloj“. Liaj E-lernantinoj el sesa klaso estas „la plej bonaj infanoj, bonegaj lernantinoj“ (vidu la foton). Modeste kaj entuziasme li rakontas, ke nun li instruas Esperanton ankaŭ al 14 lernantoj-duaklasanoj. La infanoj estas superŝtitaj de lernejoj kaj eksterlernejaj taskoj, sed ili serĉas korespondamikojn — ili trovas tempon por skribi leterojn. Kiom bone estus, se



Atanas Dimitrov kun siaj E-lernantinoj el VI klaso de lernejo „Ĥristo Botev“ — vilaĝo Bratanica.

Foto: Maria Stajkova.

ili ricevus multajn respondojn — tio entuziasmigus ilin. Ĉu BEA ne povus disponigi adresojn de aliaj infanoj — seriozaj korespondantoj! En la lernejo estas film-, skrib-, kaj diaprojekciatoro. Kaj krome — estas 20 junaj esperantistoj kaj unu agema instruisto. Ĉu ili espereble ricevos demonstraĵojn, ilustraĵojn, vidajn materialojn (filmetojn, diapozitivojn), kiuj per bildoj kaj koloroj rakontu al ili pri aliaj infanoj-esperantistoj?

MARIA STAJKOVA

## BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

### JUBILEAS

Okaze de la 40-jariĝo de Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK), reprezentanto de la redakcio renkontiĝis kun ĝia direktorino inĝ. MARIA PASKOVA kaj interparolis kun ŝi.

— Inĝ. Paskova, la Bulgara Esperantista Kooperativo ĝuas grandan aŭtoritaton pro sia multflanka utila agado. Mi petas vin koncize priskribi ĝian historion.

— Laŭ iniciato de grupo da esperantistoj kaj per la helpo de CE de BEA kaj de la Sofia E-societo „Maksim Gorkij“ la 14-an de julio 1945 estas fondita la Bulgara Esperantista Kooperativo, surbaze de la deponaĵoj de apartaj ĝiaj membroj-esperantistoj. La kooperativon subvenciis ankaŭ la Bulgara Agrar-Kooperativa Banko. En unu sola tago la la novefondita kooperativo aliĝas 52 esperantistoj kun baza kapitalo de 93 000 levoj.

La ĉefa argumento por fondo de la kooperativo estas la ideo pri financa subteno de la bulgara Esperanto-movado. Tiucele estas antaŭviditaj kreo de propra presejo, eldonado de esperantaj libroj, propagandaj materialoj kaj instruhelpiloj, aranĝo de esperantaj librovendejoj en kelkaj pli grandaj distriktaj centroj de la lando. Komence tiaj librovendejoj kaj magazenoj estas aranĝitaj en Sofio, Pazarĝik, Varna, Plovdiv, Ruse kaj poste ankaŭ en aliaj urboj.

Membroj de la unua Administra Konsilantaro de la kooperativo estas Minko Conkovski, Pantelej Gumakov, Evstati Cifudov, Vitali Julzari kaj Marin Petkov, kiuj bone komprenas, ke nur kreo de solida materiala bazo ebligas komencon de praktika laboro.

La novefondita Esperantista Kooperativo rapide elkreskas kiel solida ekonomia entrepreno, kies produktado kaj librovendejoj vekas grandan intereson ĉe la komercaj organizaĵoj kaj altiras la atenton de la loĝantaro per oferto de multspecaj varoj.

— *Kia estas la nuna stato de la kooperativo?*

— Ekde ĉia fondiĝo ĝis hodiaŭ la Bulgara Esperantista Kooperativo multe evoluis en pozitivan direkton. Nun ĝi estas unu el la prospe-

rantaj ĉeneroj de la Centra Kooperativa Unuiĝo kaj multe kontribuas por efektivigo de la starigitaj fare de niaj partio kaj registaro taskoj por havigo de diversspecaj produktaĵoj al la loĝantaro en nia lando. Nur en Sofio nia kooperativo posedas 16 magazenojn kaj librovendejojn kun jara varcirkulado de pli ol 2 milionoj da levoj kaj 22 produktadentreprenejoj, kiuj produktas varojn por 3 milionoj da levoj jare. La kooperativo disponigas ankaŭ poligrafiajn servojn al entreprenoj kaj civitanoj. La ĉefaj produktaĵoj estas arĝentaj kaj ceramikaj juveloj, diversaj modeloj da lampoj, pupoj en popolkostumoj, metalproduktaĵoj, k. a., kiuj ĝuas bonan akcepton sur la merkato.

En niaj librovendejoj (ĉiam kun etiketo „Esperanto“) oni povas trovi esperantajn librojn, memoraĵojn kaj multajn aliajn materialojn kaj produktaĵojn.

— *Kiamaniere oni povas estiĝi membro de BEK?*

— La jarkunvenoj de BEK aprobas la petojn por membriĝo, samkiel por foriro de malnovaj membroj. La kooperativon gvidas Administra Konsilantaro, elektata per la ĝenerala kunveno de la kooperativanoj por trijara mandato.

— *Ĉu la kooperativo konkrete rilatas al la agado de BEA?*

— Kompreneble! Nia E-kooperativo aktive partoprenas ĉiujn aranĝojn de BEA kaj de la Internacia E-Kursejo enlande kaj eksterlande, aranĝas standojn, en kiuj estas prezentataj ĝiaj produktaĵoj kaj varoj.

Lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto kaj la 41-a kongreso de BEA nia Administra Konsilantaro jam akceptis ampleksan programon por komunaj aranĝoj kun BEA kaj IEK. Ni merite kaj digne fieras pri la alta distingado de Bulgara Esperantista Kooperativo — la transira Ruĝa Standardo de la Centra Kooperativa Unuiĝo pro nia produktado kaj aktivado dum la tuta jaro 1984.

Ĉiuj ĉi sukcesoj kaj atingoj estas rezulto de la sindona kaj obstina laboro de la tuta kolektivo de Bulgara Esperantista Kooperativo.

Intervjuis: RADI BANĈEVSKI

# Valora eldonajo

En la redakcio de „BE“ estas ricevita broŝuro-kolekto de raportoj de la okazinta en aprilo 1984 en Varsovio Simpozio „Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo“. Ĝi estas ofsete eldonita de Pola Esperanto-Asocio; Varsovio (1985), eldonaĵo de la Eldon-Kleriga Centro „Ritmo“ kaj subvenciita de la Ministerio de Kulturo kaj Arto de PP Respubliko. Ĝi entenas 148 paĝojn.

En la kolekto estas publikigitaj 13 raportoj — inter ili de Nikola Aleksiev, Michael Behr, Linde Knöschke (GDR), Jozo Marević (Jugoslavio), Arpad Ratkai (Hungario), Edward Symoens, k. a.

En la antaŭparolo al la kolekto, verkita de la Prezidanto de PEA inĝ. Jerzy Leyk, oni legas:

„Jen vi tenas en la manoj rikolton de la simpozio „Strategiaj demandoj de la esperanto-komuneco“ okazinta aprile 1984 en Varsovio. Ne ĉiuj referaĵoj prezentitaj eniris la volumon, ĉar — kiel tio foje en tiaj situacioj okazas — kelkaj tekstoj ne venis ĝustatempe en la skriba formo al la eldonaĵoj. Ne ĉiuj, kiuj sin anoncis povis alveni Varsovion. Fine, ne ĉiuj, kiujn la organizantoj invitis trovis tempon, eblecon aŭ eventuale kialon dum tiu periodo veturi milojn da kilometroj por kelktaga restado.

Kvankam la Esperanton parolanta komuneco ne estis dum la simpozio reprezentita per sia plena diapazono da diversaj strategitipaj orientigoj aŭ esplor-skoloj, tamen ni opinias, ke la materialoj prezentitaj en tiu ĉi volumo relative adekvate registras la aktualajn konsatojn pri la E-komunumo kaj pri ĝiaj strategiaj dilemoj fine de la unua centjara ekzistoperiodo. Necesas ĉiukaze substreki, ke temas pri la vidpunktoj ekskluzive de eŭropanoj. Ili membras al Esperanto-medio diaspora, sed interne spertanta relative viglan kaj intensan transnacion kaj transkulturan kontaktadon. Al medio, kiu havas malantaŭ si jardekojn longan, stabilan ekzistadon kaj funkciadon, malgraŭ la kelkfojaj kaj kelklokaj tre tragikaj historiaj suferoj.

Okaze de scienca simpozio pri la temo, kiu rilatas rekte al la memkonscion de la socio rolanta samtempe kiel subjekto kaj objekto de la analizoj, neeviteble leviĝas kelkaj principaj demandoj.

La titolo de la simpozio ne estis elektita hazarde. La ideo pri tiutema kunveno cirkulis en internacia medio de E-esploremuloj kaj analizantoj jam de kelkaj jaroj. De tiuj medioj kaj diskutoj venis la koncepto pri la simpozia enhavo kaj maniero starigi la demandojn.

La intenco estis turni la atenton al dilemoj pli profundaj, pli fundamentaj ol strate-

gioj, planadoj kaj taktikoj de konkretaj asocioj. Temas, laŭ mi, pri tio ke la sorto de iu ajn E-asocio estas kuirata jam en la E-komunumo kaj la strategioj kaj efektivaj rezultoj de la E-asociaj strebadoj estas plejparte kondiĉitaj de la fenomenoj okazantaj en pli vasta sfero, en la monda kaj/aŭ landaj E-medioj.

Kiel organizantoj de simpozio ni dankas kore ĉiujn plurlande devenajn helpantojn kaj konsilantojn, ni precipe dankas tiujn, kiuj prelege kaj/aŭ diskute kontribuis al ĝia efektivigo. Ni ankaŭ esperas estonte aŭdi pri jam pli perfekte aranĝitaj diskutforumoj pri la lanĉita temaro. Eble alilande?

En tiu volumo ni kolektis prezentitajn dum la Simpozio referaĵojn sen iu ajn speciala sistemo. Ili do aperas laŭ alfabeto ordo de la nomoj de iliaj aŭtoroj.

Ni decidis ne enkonduki en la artikolojn mem. Ili defendu sin antaŭ via opinio, kara Leganto per siaj tekstoj.“

## Adalberto Huleš:

### „Katoj kaj ĉevaloj“

La liriko de Adalberto Huleš en ĉi tiu 80-paĝa libreto (eldonita de Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1982) estas profunde filozofia. El la neelĉerpebla fonto de eblecoj rigardi la vivon li ĉerpas riĉe. En simpla kaj komplika formo li prezentas siajn pripensadojn, kiuj montras la belecon kaj tristecon de la homa ekzistado.

Konsolaj estas atendigoj pri la naturo (Kion vi volas? Montras al visian verdon la herb! aŭ Komence de printempo, ekz.) kaj simplaj aŭ ŝajne simplaj okazaĵoj (Momentfoto. Ludo per ia memoro, ekz.). Ili trankviligas pri la entute pli maltrankviliga tendenco de la poemaro.

Ĉu la besto estas kunulo de la homo aŭ enigmo? Certe kaj tio kaj la alia kaj multe pli. Ju pli oni okupiĝas pri la 116 versaĵoj, des pli amasiĝas demandoj kaj respondoj. Al ĉiu unuopa oni povus aldoni rakonton, ofte eĉ romanon.

Katoj kaj Ĉevaloj. La libreto havas ĉapitrojn: Antikvo. Homa Kanto. Ploro por la Medium Aevum. Notaĵoj de iu Pasaĝero, Katoj kaj Ĉevaloj. Eble la plej trafa titolo estintus Homa Kanto.

Poemlibron oni ne legas kiel romanon. Ĝi estas konsultlibro, sed konsultlibro, kiun oni devas koni antaŭ ol ĝi estas uzebla. Tafa fakto por la prezentita liriko de A. Huleš.

Dankema mi estus, se la apostrofo ne tiom ofte aperus.

MONIKA LUDEWIG  
(El „Der Esperantist“, GDR, N-ro 2/1985)

# Kion oni povas fari per komputiloj?

La komputiloj troviĝas en multaj sferoj de la homaj laboro kaj vivo, ekde la industrio ĝis la hejmoj.

La granda avantaĝo de komputiloj kompare kun aliaj maŝinoj, kiuj anstataŭigas la fizikan laboron de homo aŭ besto, estas tio, ke ili faras „intelektan“ laboron: ili legas, skribas, kalkulas, „memoras“, solvas problemojn, ŝakludas kaj eĉ kreas „artajn verkojn“.

digilo. Se io ŝanĝiĝas, la sistemo povas aŭtomate korekti ĉiujn datumarojn, kie tio figuras.

## 3) TEKSTO-REDAKTADO

La komputilo multe helpas la teksto-redaktadon kaj ankaŭ la administran laboron. Oni ne devas rekomenci leteron post ĉiu eraro, ĉar eblas korekti, forigi aŭ enmeti literojn, vortojn aŭ tutan paragrafon en la tekston. Se oni sendas similajn leterojn al pluraj personoj, sufiĉas enigi nur la ŝanĝitan parton kaj la komputilo preparas la diversajn leteron. Eblas kunmeti dokumenton el pluraj partoj. Eblas ŝanĝi ankaŭ la formon.

## 4) PUBLIKAJ SERVOJ

Per komputiloj eblas kunmeti grandajn centrajn datumarojn pri plej diversaj informoj ekde la programoj de kinejoj ĝis medicinaj datumoj de malsanuloj.

Tiel sciencistoj povas havi informojn pri literaturo de sia fako, komercistoj — pri prezoj kaj stokoj de varoj, kuracistoj — pri malsanuloj.

Se iu vojaĝas, en la vojaĝoficejo oni povas rezervi bileton por aviadilo aŭ hotelĉambro. La komputilo helpas serĉi taŭgan loĝejon.

Centrajn datumarojn povas uzi ankaŭ privataj personoj, kiuj volas havi la plej freŝajn informojn pri sportaj kaj kulturaj programoj, pri aĉeteblaj varoj, politikaj kaj ekonomiaj novaĵoj, pri meteologio.

## 5) INSTRUADO

Instruisto ne povas kontroli ĉiujn lernantojn, aparte okupiĝi pri ili, ekzercigi ĉiujn laŭbezzone. La komputilo helpas kaj variigas la instruadon. Ĝi donas taskon al la lernanto kaj poste kontrolas la solvon. Se la lernanto eraras, ĝi ne grumbas, ne ridas, sed ĝi montras la solvon kaj ripetas la taskon kun aliaj datumoj, ĝis kiam la lernanto bone respondas.

Jam en ĉiam pli multaj lernejoj troviĝas mikrokomputiloj.


## 6) PAROL-PRILABORO

La komputiloj ofte transprenas la rolon de homo, sed ili restas maŝinoj; oni devas tuŝi klavojn por povi komuniki kun ili. Jam ekzistas komputiloj, kiuj povas paroli — la voĉo estas iom stranga, sed komprenebla.

La komputilo donas novajn eblecojn eĉ por muziko. Elektronika muziko ĉiam pli disvastiĝas.

Kiel bone estus, se per voĉo oni povus funkciigi maŝinojn, enigi datumojn kaj konversa-

inkciigilo  
fleksebla  
sko



Vidigilo

Klavaro

Presilo

Se oni analizus, kion povas plenumi komputiloj, ni vidus, ke tio estas rutinaj taskoj de la intelekta laboro. Do tio, kion oni povas klare difini paŝon post paŝo al la maŝino, tio estas fari **algoritmon** por ĝi. En tiuj sferoj la komputiloj ne nur helpas aŭ anstataŭigas la homan laboron, sed ili eĉ **pli bone** faras ĝin, ĉar ili funkcias **pli rapide**, **pli precize**, prilaborante **multajn** datumojn, en **kondiĉoj ne konvenaj** aŭ danĝeraj por la homo. Jen la ĉefaj sferoj, kie komputiloj estas uzataj:

### 1) INDUSTRIO

La aŭtomataj maŝinoj kaj maŝinserioj, kiujn direktas kaj kunordigas komputiloj, plenumas la produktadon tre rapide kaj precize de la unua fazo ĝis la lasta — sen homa interveno. La komputilo analizas la mezurdatumojn, la kondiĉojn kaj funkciigas la necesajn aparatojn. La uzino estas pura. La danĝerajn laborojn faras la t. n. industriaj robotoj.

### 2) ADMINISTRADO

La oficeja laboro postulas multe da atento kaj diligenco; ĉie ciferoj kaj paperoj. Malgranda eraro povas havi grandajn postsekvojn. Estas multe pli agrable sidi antaŭ mikrokomputilo, enigi datumojn pri kontoj, varoj, personoj, salajroj kaj poste la maŝino facile adicias, multiplikas, ordigas, sistemigas. Rapide pretas la **librotendado**, **registrado** kaj **grupigo de varoj**, **personoj**, **kalkulo de salajroj aŭ kapitalo** kaj aperas la dezirata listo sur la vi-

cii kun la komputilo! Eksperimentoj jam mont-ras bonajn rezultojn.

## 7) MAŜINA TRADUKADO

Informoj multas pli kaj pli. Oni povas ricevi ilin eĉ de bibliotekoj kaj de komputilaj informretoj. Sed vane, se oni ne komprenas ilin! Ne sufiĉas la tempo kaj mono por traduki eĉ la gravajn. Lingvistoj kaj komputistoj kune esploras, kiel la komputilo povus transpreni tiun taskon. Ĝia funkciado iĝas pli kaj pli malmultekosta kaj ĉiutaga. Jam aperis la unuaj rezultoj de maŝina tradukado de fakaj tekstoj.

## 8) BILDO-PRILABORO

La komputila analizo de bildoj donas utilajn informojn; tiajn, kiajn per okulo ni ne povas rimarki. Aviadilaj fotoj post komputila analizo informas la agrikulturon pri teraj karakterizoj, akvoj ktp.

■ Satelitaj fotoj malkovras energifontojn sur la tero, veterajn ŝanĝigojn.

Se radiologiajn fotojn analizas la komputilo, ĝi helpas al la kuracisto malkovri malsanon.

Per komputiloj oni povas desegni eĉ bildojn. Aperis nova arto — la komputila grafiko.

## 9) LUDOJ

Fine la plej interesa kaj alloga ebleco de komputiloj por infanoj kaj ankaŭ por plenkreskuloj estas la variaj ludprogramoj. En la klasika ŝakludo ne nur homoj ludas kun komputilo kiel kun egala partnero, sed la maŝinoj konkuras inter si mem.

Naskiĝis tute novaj ludoj, speciale komputilaj: bildoj, sonoj aperas. Premu la ĝustan klavon aŭ turnu la direktilon — kaj ek al la lukto!

Ilona KOUTNY

# TRIA NACIA SEMINARIO DE LA INSTRUISTA SEKCIO ĈE BEA

En la Internacia E-kursejo en Pisanica la 3-an—5-an majo 1985 kunvenis geinstruistoj-esperantistoj el la tuta lando por partopreni la Trian Nacian Seminarion de la Instruista Sekcio ĉe BEA, organizitan sub la aŭspicio de la Ministerio de Popola Klerigado.

La seminarion prezidis Kunĉo Vălev — ĝenerala sekretario de BEA.

Pri metodikaj novaĵoj en la Esperanto-instruado prelegis k-do Marin Bacev, ĉefmetodikisto de BEA kaj sekretario de la instruista sekcio. Li rakontis pri sugestopedio kaj speciale pri ĝia aplikado fare de d-ro Georgi Lozanov kaj liaj kunlaborantoj ĉe lernado de fremdaj lingvoj. Krome, li rakontis pri diversaj formoj de apliko de sugestopedio ankaŭ en aliaj landoj. Post la prelego estis viglaj diskutoj. Estiĝis klare, ke en iuj superaj institutoj en pluraj landoj oni eksperimentas sugestopedion, en nia lando ankaŭ, tamen ankoraŭ ne estas anoncitaj la konkludoj pri la rezultoj.

Marin Bacev rakontis ankaŭ pri la „Zagreba metodo“ kaj pri la metodo de Andrzej Pettyn en Pollando.

Sekvis prelego de Kunĉo Vălev pri kelkaj lingvaj problemoj en la ĉiutaga praktiko. Temis pri la uzado de la prepozicioj „al“, „de“, „pri“, pri la uzado de „-ig“, „-iĝ“, akuzativo post „kiel“.

Post tio la kolemino R. Janeva el Gabrovo prezentis ekzemplan lecionon pri „-et“, „-eg“, kaj la verbo-tempoj „-is“, „-os“. Interalie ŝi menciis, ke sur la nigra tabulo substantivojn

ŝi skribas per blanka kreto, adjektivojn — per verda, verbojn — per ruĝa, kaj adverbojn — per blua kreto. Sia sperto estis varme akceptita kaj aprobita de la kolegaro.

La unua tago finiĝis per „Libera tribuno“ — t. e. priparolo kaj pridiskuto de pluraj problemoj lige kun la reteno de gelernantoj kaj gekursanoj ĝenerale en la E-societoj. Unuani-me estis aprobita propono pri rekreo de „Internacia Kunliga Centro de Esperanto-Kursoj“ „ORA SPIKO“, pri kio la Instruista Sekcio devas esti iniciatinto.

Grandan intereson vekis la prelego de Violin Oljanov pri la „Rekta metodo“. Li emfazis, ke dum la tuta kurso la instruanto devas zorgi gajni la kursanojn kiel konvinkitajn esperantistojn.

Poste k-do K. Vălev parolis pri temo „La Esperanto-Leciono“ kaj pri la ĉefaj metodoj ĝin efektiviĝi.

Modelan lecionon prezentis la juna kaj entuziasma instruisto el Plovdiv Dimităr Dimitrov.

Posttagmeze okazis la konferenco de la Instruista Sekcio, kiu pritraktis la ĝisnunan agadon kaj la antaŭstarantajn taskojn. Unuani-me Kunĉo Vălev kaj Violin Oljanov estis elektitaj honoraj membroj de la sekcia estraro. Estis elektita ankaŭ nova estraro kaj buroo de la sekcio en konsisto: Ivan Pacov, Libertaria Mladenova, Petrana Milanova, Georgi Dejanov, Marija Dokova, Ani Angelova kaj Stoil Nikolov.

Petko ARNAUDOV

## HONORE AL PENKA MIHAJLOVA

La 5-an de majo ĉi-jare anoj de la Sofia E-societo „Penka Miĥajlova“ (Kolarov-subdistrikto) vizitis urbon Radomir por honorisian pereintan en la kontraŭfaŝisma batalo patroninon — la fervoran esperantistinon Penka Miĥajlova, kruele mortigita fare de la faŝistoj en la ĉirkaŭaĵo de Radomir. Sur la sama loko estis mortigitaj antaŭ 9.IX.1944 800 antifaŝistoj. La prezidanto de E-societo „Fajrero“ en Radomir Georgi Markov, la sekretario Ivajlo Zdravkov kondukis la gastojn al la mortloko de Penka Miĥajlova. Ĉe la monumento de la pereintaj antifaŝistoj sofianoj metis florkronon. K-ino Violeta Simeonova el la Urba Komitato de BKP rakontis memoraĵojn.

Poste ĉiuj partoprenis la grandan mitingon en la loko „Rastova Glava“ okaze de la 40-jariĝo de la venko super germana faŝismo kaj japana militarismo kaj 41-jara datreveno de fondiĝo de la Radomira partizana taĉmento. Ĉeestis la granda amiko de la bulgara Esperanto-movado generalo Slavĉo Radomirski.

STEFAN SOKOLOV

## KUN LA NOMO DE TRIFON ĤRISTOVSKI

**Botevgrad.** Lige kun la celebrego de la 80-jara datreveno de Trifon Ĥristovski en la faka mezlernejo pri meĥanotekniko la lernantoj el ĉiuj klasoj legis la libron „Mia vivo“ kaj diskutis pri ĝi. La vivo kaj la agado de tiu neordinara homo, komunisto kaj esperantisto vekis grandan intereson ĉe la gejunuloj. La pridiskuton plej aktive partoprenis la membroj de la lerneja E-sekcio.

Tatjana GEORGIEVA

**Botevgrad.** Antaŭ nelonge la Estraro de la Klubo de Kulturagantoj kaj la membroj de la literatura rondo „Stamen Panĉev“ renkontiĝis kun la frato kaj la fratino de Trifon Ĥristovski kaj kun gvidantoj de vilaĝo Radotina. Ĉeestis ankaŭ la popola pentristo Ljuben Zidarov — prezidanto de la Krea Fonduso ĉe la Asocio de Bulgaraj Pentristoj, kiu parolis pri la estonta arkitektura formado de la naskiĝdomo de Trifon Ĥristovski.

Mira KOLEVA

**Pomorie.** La loka E-societo „Trifon Ĥristovski“ solene celebris la 80-an datrevenon de sia patrono. Rakonton pri la komunista-esperantisto kaj publicisto Trifon Ĥristovski faris Dafina Ivanova. Alis Konstantinova legis leterojn de Trifon Ĥristovski. La lernantino Daniela Boŝnakova recitis la versaĵojn „Renkonto“ de Serafim Serafimov el Bulgars, dediĉitan al Trifon Ĥristovski.

A. KONSTANTINOVA

## CELEBRO DE KR. KARUCIN

La 16-an de majo j. k. societo „Penka Miĥajlova“ (Kolarov-subdistrikto — Sofio) en sia regula monata kunveno honoris sian estimatan membron s-non Krăstjo Karucin lige kun lia 70-jariĝo. Stefan Sokolov, prezidanto de la societo, rakontis detale pri la enhavoriĉa vivo de Kr. Karucin — kiel antifaŝisto, elstara ĵurnalisto kaj esperantisto.

Al la jubileulo oni donacis freŝajn ruĝajn rozojn. Kortuŝite, li elkore dankis al la ĉeestantoj pro ilia atento kaj amemo, kaj regalis ĉiujn per bongustaj dolĉaĵoj, preparitaj de liaj edzino kaj nepino.

L. K.

## E-NOVAĴOJ

**Vraca-distrikto. Urbo Kneja.** Jam trian jaron en la loka faklernejo pri meĥanizado de la kamparekonomio la kursanoj lernas fakultative la internacian lingvon Esperanto. Ili jam konvinkiĝis, ke pli facile kaj pli rapide ekposedas Esperanton, ol la fremdan lingvon, kiun ili lernas dum kelkaj jaroj.

Per diversaj iniciatoj ili jam popularigas Esperanton. Ekzemple, dum la antaŭ nelonge organizita Vespero de la bulgara-soveta kaj internacia amikeco, la junaj esperantistoj inspirite deklamis versaĵojn, eldiris pensojn pri la signifo de la Internacia Lingvo, kantis belsonajn kantojn kaj tiel meritis la aplaŭdojn de la ĉeestantoj.

Franc PETKOV

**Pleven.** Komence de 1985 estis fondita Kultura Esperanto-Klubo. Kiel urba kulturcentro ĝi havas la taskon unuigi la kreaĵn fortojn de la lokaj esperantistoj.

Ni bondeziru al la klubo novajn grandajn sukcesojn.

Nadja IVANOVA

## KONGRESA E-ARBARO

„... Bankja estas unika angulo de nia patrolando kaj ni devas konservi ĝin tia, kia ĝin kreis la naturo. Ni multe eraros, se ni nenigos ĝin. . .“

TODOR JIVKOV

La 21-an de aprilo j. k. la prezidanto de E-societo „Solidareco“ en Bankja Boris Atanasov sendis al la prezidanto de BEA k-do Ĥristo Gorov jenan raporton:

„Honore al la 41-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio kaj al la 40-jara datreveno

de la venko super faŝismo, la membroj de E-societo „Solidareco“ — Bankja, plantis 41 ti-larbetojn kaj kreis Kongresan Esperantan Arbaron por glorigo de la bulgara E-movado“.

Ni kredas, ke tiun imitindan ekzemplon sekvos ankaŭ aliaj landaj societoj!

#### LA REDAKCIO

**Plovdiv.** La 8-an de majo k. j. okazis komuna celebrego de la 40-a datreveno depost la venko super faŝismo, organizita de E-societo „Kulturo“ kaj Popola Legejo „Ivan Vazov“. Aktoroj el la loka teatro plenumis poezian recitalon pri la festo (V. Kurteva, M. Diŝlieva, merita aktoro Iv. Josifov). Paroladon faris k-do Ĉalakov. Rememorojn pri la milito rakontis Slavčo Nikolov, membro de E-societo „Kulturo“. Ĉeestis partoprenantoj en la Patrolanda Milito (1944—1945), kiujn oni salutis kaj donacis al ili librojn kaj florojn.

Veselina KURTEVA

#### ENHAVO

|                                                     |         |
|-----------------------------------------------------|---------|
| R. BANĈEVSKI. Jubileo de la Varsovia Kont-rakto     | II      |
| Ferij kaj lerni                                     | 1       |
| D. ĤITROV. Vivas li, vivas!                         | 2, 3, 4 |
| N. ALEKSIEV. La eterna laboranto                    | 5, 6    |
| T. ŜOŜEV. Amiko de blinduloj                        | 6       |
| H. LAINE. Forpasis Vilho Setälä                     | 7       |
| Ĥr. MANOLOV. Neforgeseblaj renkontigoj kun Dimitrov | 7       |
| C. MURGIN. La poezia verkaro de V. Oljanov          | 8       |
| N. ALEKSIEV. „Ne eblas flankenigi de l'epoko.“      | 9       |
| M. ARNOLD. Pri impona libro                         | 10      |
| *** Trifon                                          | 10      |
| M. STAJKOVA. Tri opinioj                            | 11      |
| R. BANĈEVSKI. BEK jubileas                          | 12      |
| *** Valora eldonaĵo                                 | 13      |
| M. LUDEWIG „Katoj kaj ĉevaloj“                      | 13      |
| II. KOUTNY. Kion oni povas fari per komputiloj      | 14, 15  |
| P. ARNAUDOV. Tria nacia seminario de IS ĉe BEA      | 15      |
| *** Enlanda movado                                  | 16, III |
| D. BOŜNAKOV. Granda verkisto kaj humanisto          | IV      |
| V. HUGO. Defende al Bulgario                        | IV      |

Sur la unua kovrilpaĝo: Saluton, kara Asembleo nia!...

#### NOVA KOOPERATIVA SOCIETO

En Ruse antaŭ la 9-a de septembro 1944 la esperantisto-antifaŝisto Sava Ivanov kreas E-rondeton — „Verda Stelo“. Ĝi unuigas progresemajn junulojn, subtenas la kooperativan manĝejon, disvolvas ĉiuf flankan E-agadon.

Dum la lastaj jaroj en la urbo tre rapide kreskas la E-movado, inkluzive de esperantistoj-kooperativanoj. Pro tio, laŭ decido de la Sekretario de CE de BEA, en Ruse la 13. II. 1985 estis fondita la unua kooperativa E-societo, kiun oni nomis „Verda Stelo“, ĉar ĝi estas daŭriganto de la fardo de l' iama E-rondeto.

Cefa tasko de la esperantistoj-kooperativanoj estas popularigo de Esperanto. Nun ĉe la nova societo funkcias kvar E-kursoj. Du — por kooperativanoj kun lektoroj Stojan Vojĉev kaj Maria Belĉeva kaj du — por lernantoj el la faklernejo pri navigado kaj ŝipkonstruado. Tiujn kursojn gvidas d-ro Stefan Gjaurov kaj Jana Cikalova.

Dank' al la afableco de la lerneja direktoro ing. Ivan Rusev — membro-kooperativano, la E-movado en la lernejo bone evoluas. La kursanoj — estontaj ŝipkonstruistoj, kapita-

noj kaj meĥanikistoj fondis E-klubon, unuani-me kaj entuziasme nomitan „Danubo“. Estonte, navigante laŭ la granda rivero, ili estos feliĉaj disvastigi la noblajn ideojn de la Esperanta movado pri paco kaj amikeco.

D-ro STEFAN GJAUROV



E-kursanoj el la meza faklernejo pri ŝipkonstruado kaj navigado — Ruse, kun sia kursgvidantino Jana Cikalova.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario


P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117



## GRANDA VERKISTO KAJ HUMANISTO



Victor Hugo (1802—1855)

Lia verkaro — tio estas la konscienco de Francio. Pli ol duonjarcenton tiu ĉi konscienco alvokis la francojn kaj ĉiujn homojn en la mondo al frata ĉirkaŭpreno, al tuthomara unuigo kontraŭ la milito, al nobla kaj malkaŝa batalo por defendo de la paco kaj feliĉo de la popoloj. Dum sia longa vivo li estis atestanto de iuj el la plej grandaj eventoj en la historio de lia patrolando: li vidis la bravecon de la franca popolo sur la barikadoj en 1830 kaj 1848, vidis en 1851 la perfidon de la burĝaro, ĵordonanta Francion kaj la Respublikon en la manojn de la reakcio, vidis en 1871 la malhonoron de la francaj registaroj kaj la heroaĵon de la Pariza Komuno. Prezidanto de la Unua Internacia Kunveno por Paco en 1849, ekzilito en daŭro de du jardekoj, la 75-jara Hugo alvokis la laboristojn el Parizo kaj Liono al „potenca kontraŭstaro“ al la reĝoj kaj la milito, por unuigo de ĉiuj popoloj en la nomo de ilia ĉiama revo — la paco.

Granda verkisto kaj sociaganto, humanisto kaj demokrato, apostolo de la paco en la XIX jc, la 30-an de majo 1885 Victor Hugo trapasis la vojon de la Triumfa Arko ĝis la Panteono,

kuŝanta sur la „katafalko de malriĉuloj“, meze de multmilionia Parizo, en oceano el floroj kaj homoj — homoj venintaj por adiaŭi unu el la plej grandaj filoj de Francio. Nun, post tuta jarcento, Li ne plu apartenas nur al la francoj. La konscienco kaj la koro de Eŭropo, de la tuta mondo translokiŝ Victor Hugo en la plej helan panteonon de la homaro — la panteonon de la grandaj pacifistoj.

DIMITAR K. BOŠNAKOV

## Defende al Bulgario

... Oni masakras tutan popolon. Kie? En Eŭropo. Ĉu estas atestantoj de tiu fakto? Nur unu: la tuta mondo. Ĉu la registaroj vidas ĝin! Ne...

Ni mirigos la eŭropajn registarojn, sciigante al ili ion: nome, ke la krimoj estas krimoj, ke ne estas permesate al iu ajn registaro nek al iu ajn aparta homo esti murdisto, ke Eŭropo solidare respondecas pri tio, kio estas farata en Eŭropo, ke se ie ekzistas registaro-bestio, la rilato al ĝi devas esti kiel al bestio, ke en tiu sama momento tute proksime de ni, antaŭ niaj okuloj oni mortigas, forbruligas, rabas, neniigas, buĉas gepatrojn, vendas knabinetojn kaj knabetojn, kaj la bebojn oni dishakas en du partojn; tutajn familiojn oni brulmortigas en iliajn domojn; ke la loĝantoj de urbeto nomata Batak, nur en daŭro de kelkaj horoj malpliigis de 9000 al 1300 personoj. En la tombejoj ne plu estas loko por enterigi la kadavrojn, kaj la mortintoj, rezulte de la masakroj, donas al la vivantoj peston, kiu faras sian faron...

Sed jam venis la momento levi voĉon de protesto. Komuna estas la indigno. Ekestas horoj, kiam la homa konscienco prenas la parolon kaj devigas la registarojn atenti pri ĝi. Jam estas tempo, ke la civilizo anoncu sian majestatan malpermeson. Ni, la popoloj, preskribas al la registaroj proklami tiun ĉi malpermeson. . . Ni anstataŭigu la politikajn problemojn per la problemoj pri la homo. En tio estas la estonto!...

Oni devas meti finon al la imperioj, kiuj mortigas. Ni bridu la fanatikecon kaj despotismon! Ĉesu la militoj, mortigoj, buĉado, ilin anstataŭu la libera penso, frateco kaj amikeco!

Parizo, aŭgusto 1876

VICTOR HUGO

